

**ĈIUJ MANĜIS KAJ SATIĜIS – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Luko 9, 11b-17**

**En tiu tempo Jesuo parolis al la amaso pri la regno de Dio kaj resanigis tiujn, kiuj bezonis kuracon.**

**Ekvesperiĝis, kaj la dek du, irante al Li, diris: „Forsendu ĉi tiun popolon, por ke ili iru en la apudajn vilaĝojn kaj kampojn por trovi nutraĵon kaj loĝejon, ĉar ĉi tie estas dezerta loko.”**

**Jesuo respondis: „Donu vi mem al ili ion por manĝi.” Ili respondis: „Ni havas ne pli ol kvin panojn kaj du fiŝojn; ĉu ni iru aĉeti manĝaĵon por ĉi tiu granda amaso?” Ĉeestis, fakte, proksimume kvin mil homoj.**

**Jesuo diris al siaj disĉiploj: „Sidigu ilin po kvindekope.” Tiel ili faris, invitante ĉiujn sidiĝi.**

**Tiam Jesuo prenis la kvin panojn kaj la du fiŝojn, kaj levante la okulojn al la ĉielo, ilin benis, dispecigis kaj liveris al la disĉiploj por disdono al la amaso.**

**Ĉiuj manĝis kaj satiĝis, kaj oni kolektis dek du korbojn da postrestintaj fragmentoj.**

Eŭkaristio estas la plej grava, valora momento nepra por la kresko de la individuo kaj de la komunumo. Kaj ĉiuj evangelioj estas verkitaj laŭ

eŭkaristia vidangulo. La aludo al eŭkaristio ne nur estas en la Lasta Vespermanĝo, sed ĉiuj evangelioj, de la komenco ĝis la fino, enhavas la klarigon kaj komprenigon de tiu grava momento.

Aparte en la epizodo konata kiel "la multobligo de la panoj". Ni vidu Luko-n, ĉapitro 9, versikloj 11-17. *La homamasoj eksciis pri tio kaj lin sekvis.* La homamasoj sekvas Jesuon kaj kiu estas la respondo de Jesuo? *Li ilin akceptis.*

Jesuo estas la Dio kiu akceptas, kiu ne ellasas; li estas la Dio al kiu ĉiuj ajn povas alproksimiĝi senkondiĉe, senregule, senlimige. Jesuo ilin akceptas kaj anoncas al ili la Regnon de Dio.

Kio estas la Regno de Dio? Estas la alternativa socio kiun Jesuo venis proponi, socio en kiu anstataŭ la tri malbenatajn verbojn de la havo, supreniro kaj estrado, kiuj vekas en la homoj la malammon, la rivalecon kaj la malamikecon, Jesuo proponas la Regnon de Dio, tio estas socio en kiu anstataŭ la havo estu la ĝojo kundividi, anstataŭ la supreniro estu la malsupreniro – nome taksi neniun ekster la influadiuso de propra amo – kaj precipe kie anstataŭ la regado estu la servado.

Tiu estas la Regno de Dio, nome kie Dio reĝas.

La sekvo de la anonco, la efiko kaj celo de tiu Regno estas ke Jesuo komencas sanigi kaj kuraci tiujn kiuj bezonas kuracadon. La Regno de Dio celas la bonon kaj la bonfarton de la homo. Ĝi ne estas do religio kiu ensorbis la energiojn de la homoj por honoro kaj kulto Dion, sed ĝi estas kredo per kiu Dio komunikas siajn vivenergiojn al la homoj, al la popolo, por ke ili bonfartu.

La evageliisto notas ke *ekvesperiĝis*, kaj, dum li ne indikis ajnan signon de laceco flanke de la homamasoj, estas la Dek du, ĝuste la personoj kiuj sekvas Jesuon kiuj alproksimiĝas dirante: „*Forsendu ĉi tiun popolon, por ke ili iru en la apudajn vilaĝojn kaj kampojn por trovi nutraĵon kaj loĝejon, ĉar ĉi tie estas dezerta loko.*”

Do dum la homamasoj aŭskultas tiun anoncon de la Regno de Dio, ĝuste la apostoloj, kiuj estas plej proksimaj al Jesuo, montras sin senpaciencaj, komencas laciĝi, petas ke Jesuo interrompu sian agadon.

Sed Jesuo diris al ili: *"Donu vi mem al ili ion por manĝi."* Laŭlitere Luko skribas: *"Vi mem donu manĝon"*, kiu, krom la evidentan signifon "havigu vi ion por manĝi", havas la sencon "donu vi ion por manĝi", la evangeliisto do estas aludanta – kiel ni vidos ankoraŭ pli poste – al la eŭkaristia celebrado. En la eŭkaristio Jesuo, la filo de Dio, iĝas pano, vivnutraĵo, por ke tiuj kiuj lin akceptas estu poste kapablaj iĝi pano, vivnutraĵo por la aliaj.

La dek du havas neniun intencon sin doni al la homamaso, kaj replikas: *"Ni havas ne pli ol kvin panojn kaj du fiŝojn;"* – kaj en tiu momento la tono ŝajnas iom agaca – *"ĉu ni iru aĉeti manĝaĵon por ĉi tiu granda amaso?"* La vorto utiligata de la apostoloj estas sufiĉe malestima.

Ili komprenis nenion. Dum Jesuo parolis pri 'doni' kaj do 'kundiĉi', ili rezonas ankoraŭ laŭ la kriterioj de la socio, 'havi' kaj 'aĉeti'. La evangeliisto poste notas ke *ĉeestis proksimume kvin mil homoj*. Tiu estas la nombro de la anoj de la primitiva kristana komunumo. Sed Jesuo diras al la disĉiploj – kaj li donas la unuan ordonon – *"Sidigu ilin"*

Kial 'sidigu ilin'? Ĉar dum la festaj manĝoj la sinjoroj manĝis kuŝante, sternaĝante. Do unu el la efikoj de eŭkaristio estas ke kiu partoprenas devas sin senti 'sinjoro'. Sed kiu estas la sinjoro? Iu kiu havas iun kiu lin servas; tiele povis manĝi tiuj kiuj havis servantojn kiuj estis je ilia dispono. Jesuo do petas al la apostoloj iĝi servantoj de la homamaso, por ke tiu sin sentu 'sinjoro'.

*"Po kvindekope."* Ĉi tie estas la tuta simbola serio de nombro kvin (kiel ni vidis la kvinmil) kiuj reprezentas la Sanktan Spiriton, la agadon de la Spirito. *Tiel ili faris, invitante ĉiujn sidiĝi*. La unua efiko de eŭkaristio do estas ke la homamaso sin sentu sinjoro.

Sekvas la samaj gestoj kiuj sekvas en la eŭkaristia vespermanĝo, *Jesuo prenis la kvin panojn kaj la du fiŝojn, kaj levante la okulojn al la ĉielo, ilin benis, dispecigis kaj liveris al la disĉiploj por disdono al la amaso.*

*Gravas tiu indiko kiun la evangeliisto donas al ni. Ili dispecigis kaj liveris al la disĉiploj por disdono al la amaso.* La disĉiploj estas servantoj de tiu pano, ne estas ĝiaj mastroj. Ne estas tasko de la disĉiploj decidi al kiuj permesi kaj al kiuj ne, manĝi tiun manĝaĵon. Ne estas je ilia kompetento fiksi regulojn, limojn aŭ malpermesojn.

Ili estas la servantoj de tiu ĉi pano, ne estas la posedantoj de la pano. La panposedanto estas Dio; ili estas la servantoj kiuj devas preni tiun panon

kaj ĝin distribui al la amaso. Tio estas do tre grava en la evangelioj. Oni rimarkas la mankon de peto de purigo de la manoj. La evangeliisto volas komprenigi ke ne estas vere ke oni devas sin purigi por partopreni la vespermanĝon de la Sinjoro, sed estas la partopreno al la vespermanĝo de la Sinjoro tio kio purigas la personojn, pro tio Jesuo, kiu tamen estas donanta instrukciojn pri la sidigado ktp, ne petas de la apostoloj igi la personojn sin purigi.

*Ĉiuj manĝis kaj satiĝis, kaj oni kolektis dek du korbojn da postrestintaj fragmentoj.* Dek du estas la nombro de la triboj de Izraelo. La evangeliisto volas komprenigi ke la Regno de Dio per la agado de la kundivido, ne de la amasigo do, per la agado de la servado, anstataŭ de la regado, satigas la tutan popolon.